

## MANUELA

Esperantigo : Rovere Emanuele.

Muziko / teksto : Granada Rocco.

Ole ! Famiĝas jam onidiro en Barcelono “ ke estas Manuela la plej bela knabino “.

Ole ! Post kiam mi vidis ŝin el la katedralo, plorludas gitaro mia sub la lunlumo.

Manuela, Manuela! En domo belega kaj luksa vi vivas tre sola;

vi sola, Manuela, ricevas de l'viroj sopirojn sed restas malvola.

Per amo, mi petas : komprenu, ke nur al vi donos mi la tutan koron;

Manuela, ho Manuela ! En revo plej bela elstaras la nomo : Manuela.

Ole ! Ŝanĝiĝas nun l'onidiro en Barcelono “ vi estas, Manuela, la plej bela edzino “.

Ole ! Post kiam vi diris “ jes “ en la katedralo, ĝojludas gitaro mia eĉ en mallumo.

Manuela, Manuela ! Nun en mia domo modesta ne estas vi sola;

ne sola, Manuela, infanon vi vartas kaj florojn kultivas bonvola.

per amo, vi igas feliĉaj la tempon kaj spacon en kiuj mi vivas;

Manuela, ho Manuela ! La vivon kun vi kunpartigi mi volas, Manuela .